

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

MAJO 2009

TRE INTERESA FORUMO EN MADRIDO

Dum la lasta semajnfino de aprilo, Esperanto Liceo de Madrid kaj Hispana Esperanto Federacio organizis forumon "Esperanto y Zamenhof: desafío a Babel". La celo estis celebri la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof kaj diskonigi ĝin inter ne esperantistoj, tial preskaŭ ĉiuj prelegoj okazis hispanlingve.

Juan del Castillo parolis pri la vivo kaj verko de Zamenhof ĝis la unua esperanta kongreso kaj Toño del Barrio rememoris hispanajn esperantajn pionirojn. Ĉeestis familianoj de Tudela Flores, Inglada kaj Codorniu. Vespere Jorge Camacho, en esperanto, parolis pri esperanta poezio kun vigla kolokvo intere la partoprenantoj. La lasta prelego, de Pedro Zurita, honoris la "du Ludovikojn" pli internaciaj; Braille, pri kiu ankaŭ oni festas la 200-an datrevenon de lia naskiĝo, kaj Zamenhof. Pedro Zurita respondis al multaj demandoj ĉefe pri brajlo.

La muzika parto de la evento konsistis el du koncertoj de la madridaj korusoj "Verda Stelo" (*) kiu naskiĝis antaŭ 25 jaroj aŭspiciita de Esperanto Liceo de Madrid kaj alia pli nova kies nomo estas "Esperanto"

La libroservo, organizita de la SATEH-ano Pedro Sanz estis tre vizitita kaj multaj personoj kiuj iras al la kultura centro kie okazis la forumo interesiĝis pri esperanto.

Toño del Barrio raportas amplekse pri la forumo en sia blogo: <http://www.delbarrio.eu/2009/04/la-jaro-zamenhof-ekas-muzike.htm>

(*) *La Liceo havas arĥivon (Word), verkita de la korusano Alberto, kun la historio de la unuaj jaroj de la koruso, se iu deziras povas peti ĝin al saluton@wanadoo.es*

EN HISPANIO

Abel Montagut partoprenos pere de poemoj en esperanto en la Poezia Festivalo de Palma de Mallorca kiu okazos en junio

En la semajna ĵurnalo "El Decano" de Guadalajara (2009-02-23) aperis tri paĝa intervjuo al **Lupe Sanz** kiel esperantistino kaj verkistino pri Guadalajara. Oni povas legi en la sekcio ĵurnal-tondaĵoj de www.esperanto.es

"**Koploj kaj filandroj**", la kvara poemaro de Jorge Camacho, jam aperis (Koplo: hispana poemeto. Filandro: blanka subtila fadeno, produktata de diversaj araneoj, kiuj svebas en aero dum malfrua somero). "*Koploj kaj filandroj estas la natura sekvo de "Eklipsas". Se en ĉi poemkolekto nia poeto malkovris al ni aliajn vojojn kaj vibrigis nin per neaŭditaj tonaloj, nome starigis la bazon de nova poezia universo, en la libro, kiun vi havas enmane, li montras sin mastro de tia universo.*" (Miguel Fernández, en la postparolo) <http://katalogo.uea.org/?inf=8168>

Konata slovena aktivulo, **Zlatko Tisljar**, ĉeestis eŭropan renkonton de "senjoroj" en Los Palacios (Sevilo). Dum ĉi tiu eŭropa renkontiĝo neesperantista li reklamis Esperanton: dum la renkontiĝo mem li invitis ĉiujn al rapida kurseto en kiu partoprenis dum du horoj du personoj. Dum la Festivalo de Tapas en Los Palacios li disdonis 100 faldfoliojn al junaj ĉeestantoj pri Esperanto.

Manolo Pancorbo kaj Toño del Barrio partoprenis en la **legado de "El Quijote"** ĉe Círculo de Bellas Artes de Madrido. Ili legis en esperanto parton de la 29^a ĉapitro.

Manolo Pancorbo mallonge prelegis pri Esperanto la 21an Aprilo en Universitato UNED: <http://mojose.wordpress.com/2009/04/28/pecakuco-pri-esperanto> ; ankaŭ li organizis Esperanto-budon en Librofiro en Galapagar.

ESPERANTA MONDO

Hokan Lundberg proponis, ligite al la projekto E@I, la eldonon de ampleksa broŝuro pri Esperanto, uzebla en diversaj lingvoj. http://ikso.net/tmp/broshuro_v9.pdf Oni nun serĉas komentojn, kaj kunlaborantojn por nacilingvaj tradukoj. Vidu informojn pri la projekto en: <http://vikio.ikso.net/Projektoj/Broshuro>

Kadre de la kongreso de SAT, en Teatro Saint Louis de Pau (Okcitanio) koncertis "Kaj tiel Plu". La spektaklo okazis en la kataluna, okcitana kaj esperanto. Oni ludis muzikon de la Kataluna Landaro, de Okcitanio kaj de ĉie ajn.

Pola Radio menciis en sia dimanĉa elsendo la gratul-mesaĝon ricevitan de la hispana Fundación Esperanto. Ege utilas ke aŭskultantoj (eĉ sporadaj) sendu kelkfoje gratul-mesaĝojn al Pola Radio: esperanto@polskieradio.pl kaj/aŭ barbarinella@gmail.com

La ĉiusemajnaj elsendoj en Esperanto de Radio Havano Kubo (antaŭe nur aŭdeblaj per kurt-ondoj) estas nun aŭdeblaj / elŝuteblaj rete per la paĝo: <http://www.ameriko.org/radiokubo>

Aperis nova reta scienca revuo en Esperanto. Ĝi elŝuteblas el jena adreso laŭ pdf (individuaj artikoloj aŭ la tuta revuo): <http://www.teleskopo.com/unuaeldono.htm>

Jam funkcias la nova Esperanto-ekzameno de UEA konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Filmo "Esperanto estas..." temas pri 43 min. informfilmo pri esperanto kiu montras ke esperanto estas viva, uzata kaj lingvo ŝatata de multaj homoj. La ses partoj de la filmo spekteblas ĉe <http://esperantoestas.blogspot.com>

VENONTAJ KONGRESOJ

2-a ĝis 5-a de julio 68^a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 14^a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago. www.esperanto.es. Aliĝis kaj partoprenos en la Hispana Kongreso Maciej Jaskot, kiu kunlaboras kun la E-Redakcio de Pola Radio.

28.05.-03.06.2009 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio:

8a Eŭropa Esperanto-Kongreso . <http://gek-EEK.esperanto-urbo.de>

18-25 julio. 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) Liberec en Ĉeĥio. <http://www.tejo.org/ijk/>

25-a julio ĝis 1-a aŭgusto. 94-a Universala Kongreso de Esperanto. Bialystok (Pollando). <http://94uk.bialystok.pl>

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

3an de majo, je la 19,00h kunbabilado. Gvidas Juan del Castillo

18an de majo Fotografajoj: Rigardo al la Meza Oriento.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid